

1976 decembro

69-a jaro

n-ro 852 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Libro-tag 1976

Vi trovos

sufiĉe frue en decembro ĉi tiun numeron en via leterkesto, kondiĉe tamen, ke vi ne estas unu el tiuj usonanoj, kanadanoj, aŭstralianoj, japanoj aŭ novzelandanoj, kiuj pagas kvindekono da guldenoj por regule ricevadi la revuon, sed permesas al si la lukson ne aldoni ankoraŭ iom da mono por ĝui aeran ekspedon de la gazeto kaj do ankaŭ la freŝecon de ĝiaj novaĵoj. Eble ĉio ĉi ja sonas al vi kiel maldelikata ŝerco!? Se tiel, komprenu ĝin nur kiel enkondukon al jena informo: La Komisiono por financo kaj administrado de UEA jam serioze studas la diskriminan pozicion en kiu troviĝas niaj ekstereŭropaj legantoj, kiuj, por ricevadi la revuon rapide, devas pagi kvazaŭ ian punon pro la fakto, ke la Centra Oficejo de UEA troviĝas en Eŭropo. Estas ankoraŭ frue por paroli pri solvoj, kiujn proponos la Komisiono, sed io ja okazos. Tamen, ne estos ŝanĝoj tiurilate jam en 1977. Tial por ekstereŭropanoj estas prudente reekzameni la aerpoŝtajn tarifojn en la apuda kolumno.

Enhavo

- 197 En 1976: Kvin novaj landaj asocioj en UEA (d-ro W. Bormann)
- 198 Kolektive ankaŭ por FRG: Pli ol naŭ mil ekzempleroj
- 199 Okaze de la Zamenhofa Tago: Forgesita teksto de Zamenhof (Marcel Delcourt, Jean Amoureux)
- 200 Regiona agado: Irana eksplodo (sm)
- 201 La 15a de decembro — Librotago: Aĉetu librojn por profiti (Walter Francini), Preteratentita libro: Donaco de d-ro W. Drees (W. Jansen)
- 202 Enciklopedio: Cezaro Rossetti (Marjorie Boulton)
- 203 La lingvo: Ĉu -ia aŭ simple -a? (H. Seppik)
- 204 TEJO-paĝo: NEJ kaj ĝiaj vidbendaj programoj, 546 jarojn poste, Ĉu solvo en Israelo?
- 205 Recenzoj ("Vivo de Lanti", "Nia originala prozo", "Mein geliebtes Esperanto")
- 206 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 207 Kongresa komunikado: Novaĵoj pri la 62a Universala Kongreso en Islando
- 208 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 210 Nekrologoj (N. Caruana, A. Criach Valls, P. Kulozik, A. Marinović, W. Majewski, D. Ponti, Lj. Rajšić, R. Sgroi, D. Tachauer), Oficiala informilo el la Centra Oficejo de UEA
- 211 Ekzameno "E" (B. Golden)
- 212 Indekso de la jarkolekto 1976 de ĉi tiu revuo
- 214 Anoncetoj
- 215 Anonco
- 216 Anonco

La kovrilo

"Daniel kaj la leonoj" estas la nomo de la kovrila foto, kiu — antaŭ ol enmiksiĝis nia redakcia tondilo — gajnis la duan premion en la koncerna branĉo de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA. La aŭtoro de la fotografiaĵo estas Bernard Golden, usonano longe vivinta en Afriko, sed nun jam dum pluraj jaroj loĝanta en Hungario. Golden ĉi-jare gajnis ankaŭ la Premion Harabaĝiu por Nova Talento. Cetere, niaj legantoj konas la nomon Golden ankaŭ pere de nia lastatempa rubriko Ekzameno "E", kiun li redaktas. Sed, ni revenu al "Daniel kaj la leonoj", ĉar, se Daniel estas Lariko (v. anonceton en nia revuo, septembro 1974), tiam ankaŭ li estas Golden. Ĉiukaze, Daniel estas prudenta knabo, ĉar li ĝustatempe aĉetis siajn leonojn: la "Bild-libro pri bestoj" jam komplete elĉerpiĝis. Okaze de la Librotago, pensu do pri Daniel.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Kvin novaj landaj asocioj en UEA

EN UNUIGINTAJ NACIOJ estas nun preskaŭ jam 150 ŝtatoj. UEA estas longe for de tiu ĉi nombro, bedaŭrinde. Sed ankaŭ en nia kazo kreskis la kvanto de aliĝintaj landaj asocioj kaj tio kunportis novajn pripensindaĵojn. La aliĝo de **Islanda Esperanto-Asocio** kaj de **Luksemburga Esperanto-Asocio**, komence de 1976, estis ankoraŭ glata facilaĵo. Sed la aliĝpetoj de **Centra Laborrondo Esperanto** (Germana Demokratia Respubliko), de **Korea Esperanto-Asocio** (Korea Respubliko, t.e. la suda parto de la duoninsulo) kaj de **Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko** (la slovaka parto de federacia Ĉeĥoslovakio) estis vaste diskutitaj. Nur post multa rezonado ili estis akceptitaj de la Komitato de UEA en Ateno komence de aŭgusto 1976. La publiko, kiu ĉeestis la kunsidojn de la Komitato en Ateno, povis aŭdi la argumentojn kaj la demandojn, sed por ĝenerale informi la membraron ni opiniis necesa reveni al tiuj aliĝoj en ĉi tiu artikolo.

Korea Esperanto-Asocio (KEA) estas nun la unueca organizaĵo de la esperantistoj en tiu lando, kie antaŭe ekzistis pluraj asocioj, el kiuj nur unu estis aliĝinta al UEA. Anstataŭ malfondi la ne-aliĝintajn kaj membrigi ĉiujn esperantistojn en tiu lando al la aliĝinta asocio, la koreaj esperantistoj preferis la vojon de kompleta restrukturigo. Sed malgraŭ tio eblis rekonigi la nunan KEA kiel postsekvanton de la aliĝinta movado. Pro tio



Esperanto-kurso en Seŭlo: La korea movado estas juna.

ĝia akcepto estis rigardata ne kiel principa demando. Estis por la komitatanoj malfacile prijuĝi, kiujn eblojn la Esperanto-movado havas por sia laboro sub kondiĉoj de la Korea Respubliko — lando, kies cirkonstancoj estas konataj al la eŭropanoj nur el la gazetoj. La asertoj de la reprezentantoj de Korea Esperanto-Asocio pri ĝiaj laboro kaj intencoj konvinkis hezitantajn. Kaj, ĉar ankaŭ antaŭaj estraroj de UEA jam rekomendis la aliĝon de la korea movado al UEA, kaj antaŭaj komitatoj tion akceptis, ankaŭ la Komitato en Ateno voĉdonis favore por nova ekstereŭropa landa asocio de UEA.

Esencan problemon levis la aliĝpeto de **Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR)**. El la ŝtato Ĉeĥoslovakio jam estas aliĝinta en UEA Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), kaj nun venis dua landa asocio el la sama ŝtato. Ĝia aliĝo principe malfermus la membriĝon en UEA de multaj Esperanto-asocioj el ŝtatoj, kiuj laŭ siaj konstitucioj estas federacioj. Neniu kontestas, ke Ĉeĥoslovakio estas relative unuece gvidata ŝtato, dum aliaj federacioj estas sufiĉe heterogenaj, ĉefe en kulturaj aferoj, ekzemple Federacia Respubliko Germanujo, Svislando, Soveta Unio, Usono. La Komitato pretis akcepti la aliĝpeton de AESSR, nur kiam reprezentanto de ĈEA deklaris kiel volon de la du asocioj iam prezenti nur unu membrecon en UEA. Tio tamen eblas nur se la du nunaj asocioj povas intertrakti pri tio sur egala nivelo, kaj tio necesigas la aliĝon de AESSR.

Centra Laborrondo Esperanto (CLE) intertraktis kun UEA pri sia aliĝo dum pluraj jaroj. Pri tio jam aperis informoj en la Movado kaj tio ebligis al la plej diversaj esperantistoj diri siajn opiniojn. Komence, CLE havis kaj statuton ("regularon") kaj "gvidprincipojn". Tio ne estas io aparta, ĉar multaj landaj asocioj dum siaj kongresoj akceptas rezoluciojn, kiuj ligas la agadon de la asocio dum difinita periodo. Ili estas, kompreneble, pli detalaj reguligoj ol statuto, ĉar ili validas nur dumtempe kaj estas celorientitaj. Ofte gvidprincipoj pro sia detaleco entenas konstatojn, kiuj tre rekte rilatas al la enlandaj cirkonstancoj kaj tial atentigas la opiniojn de la publiko, la informmedioj, la parlamentanoj kaj la registaro. Prijuĝi tian materialon el eksterlando estas ĉiam malfacile. Tial la statuto de UEA, en la artikolo pri la neŭtraleco de siaj landaj asocioj, postulas tute prave neŭtralecon en iliaj statutoj kaj ne penas ĉiuneron en la agadoj de la landaj asocioj (artikolo 13: "... landa asocio esperantista povas aliĝi al UEA, ... se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de par. 4", t.e. rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj).

Sed CLE faris la gvidprincipojn en sia statuto devigaj por siaj membroj. Ke dumtempa gvidlinio estas enenata en la statuto, estas nekutime. Per tio tutaaro da devoj eniris nerekte en la statuton de CLE. Tiu katalogo estis por la Estraro de UEA tro vasta; ĝi povas rekomendi nur tian asocion, en kiu la membriĝinta esperantisto estas devigata labori por Esperanto, kaj ne por iu alia ideo aŭ koncepto. La ligiteco de la celo Esperanto (kun ĝiaj apartenaĵoj, kiel ekzemple homaj

rajtoj, lingva diskriminacio k.s.) kun iu ajn alia celo estas kaj restas ne akceptebla. Aliaj celoj estas la laborkampoj de fakaj kaj similaj asocioj kiel KELI, MEM, Eŭropa Agado, SAT. Tiun ĉi sintenon de la Estraro de UEA komprenis kaj akceptis la gvidorganoj de CLE. Ili ellaboris novan statuton kaj prezentis ĝin al la Estraro kaj Komitato en Ateno. Ĝi ne plu entenas devigon por la membro sekvi iun gvidlinion, sed submetas la organizitajn esperantistojn en Germana Demokratia Respubliko al nur jenaj devigaj celoj: "disvastigi la internacian lingvon Esperanto en GDR, apliki Esperanton en la servo de la popola amikeco, por paco kaj humanismo, konigi la materiajn kaj spiritajn atingojn de la socialisma GDR en eksterlando, kunlabori kun naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj sur la bazo de la reciproke validaj statutoj" (la celparagrafo 3). Tiuj preskriboj inkluzive de la diskonigo de la situacio en la hejmlando troviĝas ankaŭ en la statutoj de aliaj landaj asocioj, kiuj estas membroj de UEA dum jardekoj. "Devoj por la membroj" (paragrafo 6) estas "aktive propagandi, funde lerni kaj apliki la Internacian Lingvon Esperanto laŭ la celoj fiksitaj en § 3" kaj regule pagi "la fiksitan kotizon".

Post kontentiga solvo de tiu problemo per la nova statuto, restis unu komplika demando. En kelkaj landoj, inter ili la socialismaj, la Esperanto-asocioj ĝenerale troviĝas en speciala kontakto kun iu granda instanco, ĉu (kultur-)ministerio, ĉu sindikato, ĉu alia kvazaŭtegmenta institucio. La rilatoj inter tiu ĉi

publika instanco kaj la Esperanto-asocio estas tre diversaj. Tion konsciente, antaŭaj estraroj de UEA kaj la Komitato akceptis tiajn landajn asociojn kaj bone kaj harmonie kunlaboris kun ili dum jardekoj. En la kazo de CLE, tiu ĝenerala instanco, patronanta CLE, estas la "Kulturligo en GDR", kies unu "laborrondo" estas CLE. La Kulturligo estas la organizilo de kulture aktivaj personoj en tiu lando, kaj ĝi havas nur ses branĉojn: literaturo kaj arto, naturamikoj, fotografio, filatelo, scienco kaj klubo de intelektuloj, Esperanto. La vicigo de Esperanto en tiu ĉi listo estas grava rekono por nia afero, kaj en multaj landoj la esperantistoj ĝojus pri tia rekono. Sed por UEA kaj la aliĝpetanta CLE tiu organiza kadro elstarigis la problemon de dependo. La reprezentantoj de CLE povis konvinke klarigi al la Estraro kaj la Komitato — kie tiu ĉi demando estis vaste diskutita —, ke "la organizitaj esperantistoj formas relative sendependan kaj klare kaj unuece strukturitan unuon en Kulturligo de GDR, kiu laboras laŭ specifaj celoj" (el la aliĝpeta letero de CLE de la 6a de julio 1976).

En la dujara korespondado pri la aliĝpeto estis ankaŭ traktita la demando, kiel statos la rilatoj inter la Movado en GDR kaj la cetera mondo por ĉiu unuopa membro de CLE. La Estraro de UEA insistis, ke post iom da adapta tempo la esperantistoj en GDR devos havi la samajn rilatojn al sia UEA (ekz. membriĝo, delegitiĝo, ricevo de eldonaĵoj de UEA, kongresvizitado k.s.), kiel la esperantistoj en similaj landoj, ekz. en la orienta Eŭropo. Tio, kompreneble, signifas por tiuj esperantistoj, vivantaj nuntempe ankoraŭ iom ekster la tutmonda Movado, integriĝon en la internacian vivon de UEA. La Estraro de CLE povis doni kontentigajn deklarojn pri tio, parte ankaŭ nome de oficialaj instancoj de GDR.

Post tiuj preparaj paŝoj la Estraro de UEA deklaris pri la aliĝpeto de CLE antaŭ la Komitato en Ateno: "La Estraro trastudis la peton de CLE aliĝi al UEA kiel landa asocio, senditan al ĝi la 6an de julio 1976. Ĝi notis, ke CLE akceptis ĝiajn sugestojn pri strukturaj kaj regularaj modifoj de antaŭ unu jaro. Ĝi vidas en la proponata aliĝo multajn avantaĝojn por Esperanto en GDR kaj por la Esperanto-movado ĝenerale. Ĝi notas, ke per tiu aliĝpeto prezentigas speco de organizaĵo ne antaŭvidita en la statuto de UEA. Pro la ĉi-supre menciitaj konstatoj, la Estraro rekomendas, ke la Komitato pesu la diversajn aspektojn de la demando, sed ĝenerale opinias, ke estas eble al la Asocio akcepti CLE kiel aliĝintan landan asocion". La akcepto en la Komitato okazis poste kun granda plimulto (por 45, kontraŭ 4, sindeteno 1).

En la jaro 1976 do membriĝis en UEA kiel aliĝintaj landaj asocioj kvin movadoj, el ili du el okcidentaj landoj, du el socialismaj ŝtatoj kaj unu ekstereŭropa. Nuntempe okazas korespondado kun kelkaj organizaĵoj de esperantistoj pri ebla aliĝo. La aliĝemo restas forta: signo pri la kompreno de la centra pozicio de UEA.

D-ro W. Bormann,
estrarano pri landa agado

KOLEKTIVE ANKAŬ POR FRG:

Pli ol naŭ mil ekzempleroj

Post Belgio kaj Pollando, jam la tria lando (se ne enkalkuli la etan Malton) kontraktis kun UEA pri kolektiva abono de la revuo *Esperanto*, kio altigos ĝian eldonkvanton al pli ol 9 000 ekzempleroj monate. Temas pri Germana Esperanto-Asocio (FR Germanio), kiu abonigas siajn preskaŭ 1000 membrojn al la revuo de UEA, rezulte de plurjaraj malfacilaĵoj pri eldono de revuo en FRG. Diference de Belga Esperanto-Federacio, sed same kiel Pola Esperanto-Asocio, GEA mem administras kaj ekspedas la revuon al la abonantoj, ricevinte ĝin kvante el Nederlando. La aranĝo komenciĝos jam en januaro 1977, tiel ke la membroj de GEA, okaze de la jarkunveno en Paderborn, fine de majo 1977, povos surbaze de siaj impresoj pri la unuaj kelkaj monatoj decidi, ĉu GEA daŭrigu la aranĝon ankaŭ en 1978. Individuaj membroj de UEA, kiuj samtempe estas membroj de GEA, povos do estonte ricevi la revuon kaj jarlibron, pagante al UEA nur la kotizon de MJ (20 markojn).

Forgesita teksto de Zamenhof

LAŬ *Originala verkaro* (p. 556), en la rubriko "Ĝis nun nepresitaj leteroj", la letero n-ro 297, adresita al la redakcio de *Ruslanda esperantisto*, en realeco jam aperis presita en la n-ro 2 de julio 1905 de ĉi tiu gazeto. La letero (OV, n-ro 281) al D-ro Asnes, de la 8a de julio 1905, anoncas ĉi tiun presotan leteron. Tial, komparante, ni povas konstati eraron en la verko de Dietterle koncerne la frazon: "Mi deziras al ĝi, (t.e. al la gazeto) ke ĝi glorie plenumu sian taskon, ke ĝi frate unuigu inter si ĉiujn foliojn de Espero kaj helpu ilin agadi sukcese per fortoj kunigitaj."

La esprimo **foliojn de Espero** estas sensencaĵo. La letero presita en *Ruslanda esperantisto* tekstas **filiojn de "Espero"**. Se oni scias, ke la Peterburga esperantista societo nomiĝis "Espero" kaj havis filiojn en diversaj urboj: Melitopolo, Odeso, Voroneĵo..., klariĝas tiu esprimo, kaj oni rajtas miri kial la transskribinto forgesis la citilojn signantajn la vorton Espero.

La lasta frazo de la letero de d-ro Zamenhof tekstas: "Mi esperas, ke ambaŭ niaj ruslandaj organoj "Esperanto" kaj "Ruslanda Esperantisto" ĉiam reciproke sin helpados kaj subtenados kaj multe akcelos la ekfloron de nia afero en nia vasta regno".

La unue menciita organo *Esperanto* estis fondita de d-ro Ostrovski el Jalto, kiu ricevis permeson de la cenzuro komence de 1905, kiam la unua rusa revolucio lasis iom da libero. Estas korektinda la jaro 1895, indikita en la *Enciklopedio* (art. Ostrovski) kaj ankaŭ en la *Bibliografio* de Stojan, kiu, sub n-ro 3532 donas kiel lim-aperdatojn de la gazeto: januaro 1904 — februaro 1905. Dum januaro kaj februaro 1905 eliris tri duoblaj, 24-paĝaj numeroj, aperintaj kun grandega malfruo. Dank' al la deviga dato de presigo, ni povas konstati ekzemple, ke la dua kajero, numerita 3-4, eliris el la presejo nur la 28an de marto.

En la unua numero estas presita salutletero de d-ro Zamenhof, adresita al d-ro Ostrovski. Ĉi tiun leteron nek Dietterle, nek prof. Waringhien, nek Holzhaus mencias en siaj respektivaj verkoj pri la Zamenhofaj tekstoj. Por ke ĝi ne forgesiĝu jen ĝia fidela kopio:

(nedatita)

Kun ĝojo mi salutas la unuan rusan gazeton dediĉitan al la afero de la lingvo internacia Esperanto. Tiu ĉi gazeto aperis malfrue, tre malfrue ... Sed pli bone malfrue, ol neniam ...

La lingvo Esperanto naskiĝis en Rusujo kaj la unuaj lernolibroj kaj vortaroj estis eldonitaj en la lingvo rusa; tial ne estas mireble, ke ankaŭ la unuaj amikoj de tiu ĉi lingvo estis rusujanoj. En la unua serio de la esper-

antistoj, eldonita en la jaro 1889, inter 100 adresoj oni apenaŭ trovis kelkajn dekojn da adresoj eksterlandaj, — ĉiuj aliaj estis el Rusujo.

Oni devis tial antaŭvidi, ke ankaŭ la unua esperanta gazeto aperos en Rusujo. Sed kvankam la aŭtoro de Esperanto komencis klopodi pri tio-ĉi jam en la jaro 1888, liaj penadoj ne havis sukceson. Pro diversaj kaŭzoj ne sole gazeto ne povis eliradi, sed ankaŭ la disvastigado mem de la lingvo Esperanto estis ligita sur ĉiu paŝo kun grandaj malfacilaĵoj. Kaj se malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la afero de la lingvo ne pereis tuj en la komenco, tio venis nur de tio, ke la aŭtoro de la lingvo tiam estis ankoraŭ juna kaj havis ankoraŭ sufiĉe da energio, por ne perdi la kuraĝon kaj batali kontraŭ la malfacilaĵoj.

Tamen pli aŭ malpli frue tiu-ĉi energio devis elĉerpiĝi. La materiala situacio de la aŭtoro jam de longe estis tre malbona kaj, kiam en la jaro 1895 al la sola esperanta gazeto (kiu eliradis en Nurenburgo) en unu bela tago estis fermita la enirado Rusujon, kie ĝi havis pli ol duonon de siaj abonantoj, tiam ĉe la aŭtoro falis la manoj.

Sed feliĉe al tiu tempo la afero de la lingvo Esperanto jam sukcesis fortiĝi en la eksterlando. Jen tie, jen aliloke komencis aperadi varmegaj laborantoj, kaj iom post iom la tuta pezocentro de la esperanta afero transŝoviĝis eksterlanden (precipe Francujon). Kaj en Rusujo

Январь 1905.	№№ 1—2.	Januaro 1905.
ESPERANTO.		
Журналъ для распространения международнаго языка въ Россіи. С.-Петербургъ. Ред. д-ръ И. ОСТРОВСКІЙ.		Jurnalo por propagando de lingvo internacia en Ruslando. Peterburgo. Redaktoro D-ro I. OSTROVSKI.
ОГЛАВЛЕНИЕ.		ENHAVO.
Съ полной надеждой...		Kun plena espero...
Д-ра И. Островскаго.		D-ro I. Ostrovski.
Съ радостью приветствую...		Kun ĝojo mi salutas...
Д-ра Л. Заменгофа.		D-ro L. Zamenhof.
Значение журналовъ на родномъ и международномъ языкахъ.		Graveco de la jurnalaj naciaj-Esperantaj.
Л. де-Бюфрона.		L. de-Beaufront.
Къ Эсперантистамъ.		Al la esperantistaro.
А. Кофмана.		A. Kofman.
Труденъ-ли языкъ Эсперанто?		Ĉu la lingvo Esperanto estas malfacila?
Д-ра И. Островскаго.		D-ro I. Ostrovski.
Маленькое письмо стараго эсперантиста.		Malgranda letero de malnova Esperantisto.
И. Пучковскаго.		I. Pučkovski.
Конгрессъ Эсперантистовъ въ 1905 г.		Kongreso esperantista en 1905 jaro.
Изъ Конгресса Философовъ въ Женевѣ въ 1904 г.		El Kongreso de Filozofistoj en Ĝenevo en 1904 jaro.
Д-ра А. Гринфельда.		D-ro A. Grinfeld.
Библиографія.		Bibliografio.
Д-ра И. Островскаго.		D-ro I. Ostrovski.
Журналъ „Международное Научное Обозрѣніе“ (на языкъ Эсперанто).		La ĵurnalo „Internacia Scienca Revuo“ (en lingvo Esperanto).
Д-ра А. Гринфельда.		D-ro A. Grinfeld.
Хроника.		Kroniko.
Нѣсколько словъ къ нашимъ единомышленникамъ и читателямъ.		Kelkaj necesaj vortoj al niaj samideanoj kaj legantoj.
Д-ра И. Островскаго.		D-ro I. Ostrovski.
Перечень всѣхъ журналовъ и газетъ на яз. Эсперанто.		Nomaro de ĉiuj jurnalaj kaj gazetoj en lingvo Esperanto.
Е. Радванъ-Рыпинскаго.		E. Radvan-Ripinski.
Почтовый ящикъ.		Poŝta kesto.
Грамматика яз. Эсперанто.		Gramatiko de la lingvo Esperanto.
Объявленія.		Annuncioj.

La kovrila paĝo de la revuo de Ostrovski el la jaro 1905.

pro diversaj malfacilaĵoj la afero komencis ĉiam pli kaj pli fali.

Nun, kiam en la eksterlando eliras jam pli ol dudek esperantaj gazetoj, aperis fine ankaŭ la unua esperanta gazeto en Rusujo. Estas domaĝe, ke ĝi aperis tiel malfrue, sed – ni ripetas – pli bone malfrue ol neniam. Nun, kiam en la eksterlando la afero esperanta faras grandegajn paŝojn antaŭen, ni esperu, ke ĝi ankaŭ en Rusujo reviviĝos kaj la nunaj rusaj esperantistoj jam ne devos bataladi kun tiaj malfacilaĵoj, kun kiuj devis bataladi la unuaj pioniroj.

L. Zamenhof

Kunlabore verkis, Marcel Delcourt
Jean Amoureux

REGIONA AGADO:


Irana eksplodo

PASINTJARE, en nia oktobra numero (p.174), aperis iom timema anonco de 52-paĝa studo pri Esperanto, en renoma universitata periodaĵo *Dānesh-kadeh*. Nun montriĝas, ke tiu studo estis nur unu ero en tuta publika lavango pri Esperanto, spertata en Irano lastatempe: En tri sinsekvaj numeroj de la grandformata magazino *Negin* (n-roj 128-130), komence de ĉi tiu jaro, aperis pli ol 20-paĝa studo de d-ro M.H. Saheb-Zamani sub la titolo "Homo kaj revolucio lingva"; studoj de la soveta geografo prof. d-ro D.L. Armand, aperis traduke en *Pagam novin* kaj *Dānesh-kadeh*; aperis ankaŭ artikoloj de M.M. Mojed, R. Afšer, d-ro R. Mazlumi, en *Hoĥest*, *Ĥaudanika* kaj ree en *Dānesh-kadeh*, kiu dum la lasta jaro publikigis minimume 5 ampleksajn artikolojn pri Esperanto kaj la lingva problemo, ĉiuj verkitaj de d-ro M.H. Saheb-Zamani.

Kiu fine estas tiu d-ro Saheb-Zamani? Li studis psikologion en FR Germanio kaj ŝajne tie konatiĝis kun Esperanto. Jam en 1951 li aperigis eble la solan artikolon pri Esperanto en Irano en tiu silenta periodo inter 1938 kaj 1975. Tamen, la reaktiviĝo de d-ro Saheb-Zamani okazis nur iam pasintjare, sed ĉi-foje tiom plene kaj grandskale, ke Esperanta aktiveco certe prenas pli da lia tempo ol liaj lekcioj en la Teherana Universitato aŭ okaza prizorgo de pacientoj. En marto 1975 li prelegis pri Esperanto en la Universitato de Teherano, en aprilo ĉi-jare li aperis en du aliaj prelegejoj de la irana ĉefurbo, en majo li parolis dufoje en teheranaj



Supre: Unu el Esperanto-kursoj en Teherano; la kutimaj klasĉambroj ne povas enteni ĉiujn, kiuj volus lerni. Dekstre: D-ro M.H. Saheb-Zamani.



altlernejoj kaj vojaĝis samcele al la provinco Lorestan, en junio li prelegis en Ramsar por mezlerneja instruistaro, en julio lian prelegon pri Esperanto aŭskultis membroj de Islama Instruista Asocio. Kaj, ne temas pri prelegetoj por malgrandaj grupoj: ĉiun prelegon de d-ro Saheb-Zamani ĉeestis centoj da aŭskultantoj, entute pli ol 6 000 homoj! Plurajn prelegojn faris ankaŭ d-ro Dana Beheshti, universitata docento, unu el la lernantoj de d-ro Saheb-Zamani.

Sekvis kursoj. Ne multaj, ĉar mankis instruistoj. Tamen, temis pri centoj da gelernantoj, ĉefe junaj. En la grupo de d-ro Beheshti, en junio ĉi-jare, lernis 176 personoj. Pri Esperanto montris intereson du iranaj universitatoj kaj ankaŭ la Eduka Ministerio de Irano.

En nia septembra n-ro ni anoncis, ke en aŭgusto al Eŭropo venis irana instruistino, kiu volas dum unujara restado eksterlande sperti ĝis tiu grado, ke ŝi poste povu instrui Esperanton en Irano. Temas pri s-ino Moulud Saghafian, kiu post dusemajna restado en la kastelo Grésillon pasigis pli ol du monatojn ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Komence de novembro, s-ino Saghafian transiris al FR Germanio, kie ŝi daŭrigos sian lernadon en la Esperanto-Centro Paderborn. Ŝi atentigas, ke iusence ŝia restado en Eŭropo estas nur eksperimento: Se ĝi montriĝos fruktodona, venos pliaj irananoj por kapabliĝi pri la instruado de Esperanto.

Lasta novaĵo el Irano: En oktobro ĉi-jare la Universitato de Teherano publikigis en aparta 36-paĝa bel-aspekta broŝuro la novan studon de d-ro M.H. Saheb-Zamani – "La kulturo kaj la revolucio lingva". Krome, por planataj ekspozicio kaj Esperanta biblioteko, al Teherano jam iris libroj kaj aliaj materialoj en valoro de ĉ. 2 000 guldenoj.

دکتر ناصرالدین صاحب الزمانی
فرهنگ و انقلاب زبان

M. H. SAHEB-ZAMANI, PH.D.
**LA KULTURO
KAJ
LA REVOLUCIO LINGVA**

معرفی برترین دستاوردها در قلمرو زبان
مجلس سنجش ادبی و فرهنگی دانشگاه تهران
شماره ۲۵۳۵، ۲۰۱۴

ENKONDUKO JE LA PLEJ SUPERA ATINGEJO
HOMARA EN LA REGNO LINGVA...ESPERANTO
UNIVERSITATO DE TEHRANO
1976 OKTOBRO

Aĉetu librojn por profiti

LA LITERATURO en Esperanto kreskas konstante. Ĉiu numero de ĉi tiu revuo prezentas la lastajn novaĵojn en la eldona kampo. Kelkfoje temas pri imponaj verkoj, kiuj restas kiel mejloŝtonoj en la literaturo de la Internacia Lingvo, ekzemple: *Esperanto en perspektivo*. Kompreneble, kiel ĉe la literaturoj nacilingvaj, temas plejofte pri verkoj ne tiel gravaj, tamen indaj je legado pro multaj kialoj.

Homoj ne emas doni kaj ricevi kompanse nenion. Do estus vane skribi ĉi tie, ke oni aĉetu Esperantajn librojn nur por helpi la disvastigon de niaj lingvo kaj kulturo. Tial ni analizu la ĉefajn avantaĝojn de konstanta legado de Esperantaj verkoj.

Unue, mi kredas, ke tio altigas la ĝeneralan kulturon. Mi persone havis ŝuldon al la monda ĉefverko *La dia komedio*. Mi estas brazilano, italdevena, kaj studis ĉe mezlernejo nomita ĝuste laŭ Dante Alighieri. Dum la lernejoj jaroj mi legis kelkajn malgrandajn pecojn de tiu ĉefverko. Tamen, poste mi neniam kuraĝis legi ĝin komplete. La oportuno alvenis ĉe la apero de la eldono dulingva: itala kaj Esperanta. Ne nur mi legis la Esperantan tradukon sed ankaŭ, helpe de ĝi, la italan originalon, kiu estas malfacila ankaŭ por tiuj,

kiuj posedas la italan lingvon, ĉar temas pri ĝia formo plej malnova, el la 14a jarcento.

Alia avantaĝo estas, ke la literaturo en Esperanto permesas koni ĉefverkojn, kies nacilingvaj tradukoj malfacile troveblas. En Brazilo mi konas ekzemple nenion portugalan tradukon de la hungara poeto Sándor Petöfi. Mi ĵus legis lian *Libero kaj amo*, en traduko de Kalocsay, kaj tiel mi povis ĝui la arton de la elstara kreinto de *Johano la brava*. Tio estas granda servo: Esperanto kiel ponto por la kono de aliaj kulturoj. Mi substrekas, ke tio estas profesie grava por mi, ĉar mi instruas lingvon kaj literaturon. Kompreneble alispecaj profesiuloj trovas ankaŭ taŭgajn librojn por siaj fakoj.

La riĉiĝo de la lingvaj konoj estas alia avantaĝo ne maltrafinda. *Fundamenta krestomatio* estas sendube baza libro por esperantisto, tamen por multaj ĝi restas ankaŭ la sola legita verko. Ĉu tio estas ĝusta sinteno, se oni konsideras, ke ĝi aperis en 1903 kaj de tiam la lingvo multe kreskis?

Tamen, mi kredas ke la elstara avantaĝo de la literaturo en Esperanto povas esti ankaŭ komerca, ĉar ĝi kapablas signifi la plej grandan fonton de enspezoj por Esperanta klubo. Tio okazas ĉe San-Paŭla Esperanto-Asocio, precipe de post ĝia decido starigi apartan librovendejon en alia loko. Libro vendiĝas, se la klubanoj havas okazon vidi ilin sur stando. La kluboj, kiuj ankoraŭ ne havas libroservon, faru provon: aĉetu malgrandan stokon da libroj kaj ilin elmontru. Ili malaperos rapide . . .

Walter Francini

PRETERATENTITA LIBRO:

Donaco de d-ro W. Drees

LA 5an DE JULIO 1976 naŭdekjariĝis d-ro Willem Drees, esperantisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. D-ro Drees, kiu ascendis en la nederlanda parlamento de stenografo (1906-1919) al parlamentano (1933-1940), ministro pri sociaj aferoj (1945-1948), kaj fine al ĉefministro (1948-1958) estas vaste konata kiel iniciatinto de la ĝenerala ŝtata pensio en Nederlando kaj iasence kiel unu el la ĉefaj rekonstruintoj de la lando post la Dua Mondmilito.

Ĝuste pro lia senĉesa interesiĝo pri Esperanto estas mirige, ke kelkaj eroj el lia antaŭ unu jaro aperinta furora nederlandlingva verko *La nederlanda parlamento en la pasinteco kaj hodiaŭ* entute ne trovis mencion en la Esperanta gazetaro, des pli ĉar en preskaŭ dudekpaĝa ĉapitro la aŭtoro donas klaran eksponon de la internaciigo de la parlamenta laboro kaj speciale la rolo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj. La laboro de la parlamentanoj akcele malfaciliĝis dum kreiĝis kaj ekfunkciis interŝtataj organizoj kiel Ligo de

Nacioj, Interparlamentara Unio, k.s. Traktante la plimultiĝon kaj pligraviĝon de tiuj organoj tra duona jarcento, aktive de li travivita, d-ro Drees venas al tiuj gigantaj nuntempaj konstruaĵoj kiel UN, Eŭropa Komunumaro, k.a., kies monstrajn traduk- kaj interpret-aparatojn li trafe kontrastigas al la relativa simpleco de la lingva problemo en Benelukso (fondita en 1944).

Tamen, unu aspekto de la lingva problemaro en internaciaj rilatoj (krom evidente teknikaj, financaj, k.a. facetoj) jam manifestiĝis en tiu malgranda Benelukso, nome la psikologia privilegiigo de iuj partneroj je la kosto de aliaj, al kio poste — kun la kreo de pli grandskalaj eŭropaj kaj tutmondaj instancoj — aldoniĝis la nekontentigaj kaj neperfektaj tradukadoj kaj interpretadoj kaj la sankcio de esence maljustaj "solvoj" en la formo de laborlingvoj kaj oficialaj lingvoj.

Sur pluraj paĝoj la aŭtoro argumentas por la alpreno de unu neŭtrala, nenacia lingvo, uzota apud ĉiuj naciaj lingvoj. Esperanto, laŭ d-ro Drees "plene elprovita solvo", tie prezentas la ununuran alternativon de daŭre kreskanta lingva konfuzo.

La nederlanda Esperanto-movado ne estus povinta ricevi pli trafe skribitan pledon por la Internacia Lingvo ol tiun, kiun la aŭtoritata d-ro Drees donacis al ni kaj al la nederlanda publiko ĝenerale.

W. Jansen

Cezaro Rossetti

CEZARO ROSSETTI naskiĝis la 18an de oktobro 1901 en Glasgovo, de svisaj gepatroj. En 1919 li iris al Hindujo, kie li pasigis ses jarojn. Li estis aventurema, preferis migran vivmanieron kaj estis tre societema, bona rakontisto, vigla, energia kaj sprita; humuro, truko, ĵonglado, intereso pri kuriozaĵoj gravis en lia vivostilo; tre malavara, li ne zorgis pri ŝparado. Li subtenis sin diversmaniere, ĉefe per restoracieto, kiel kuiristo, kiel eksponisto de senakvaj kuirpotoj kaj aliaj varoj, aŭ kiel komercisto. Li esperantistiĝis en 1928, kune kun sia pli juna frato Reto Rossetti en la tre vigla tiama SAT-klubo en Edinburgo, Skotlando. Reto Rossetti instigis lin verki Esperante, ĉar liaj konversacioj estis riĉaj je amuzaj anekdotoj. Li povis verki nur en aŭtobusoj aŭ trajnoj, aŭ foje dum nokta maldormado, pro sia migra vivmaniero; tamen li tiel verkis la unikan Esperantan aŭtobiografiecan romanon, *Kredu min, Sinjorino!* Kvankam granda stoko da anekdota materialo restis ĉe li, li ne volis verki alian libron pri simila medio, sed volis krei ion tute alispecan. La nova plano estis nur en komenca stadio, kiam Cezaro Rossetti subite mortis pro kormalsano, la 6an de majo, 1950, do nur 48-jara. *Kredu min, Sinjorino!* aperis kelkajn monatojn post lia morto.

*Kredu min, Sinjorino!*¹⁾ (Rossetti mem titolis ĝin *Senblage*, sed la eldonisto Jung petis modifon) estas ankoraŭ unu el la plej ĝue legeblaj kaj stile sparkantaj Esperantaj romanoj. Mankas bone plektita intrigo: ĝi estas romaneca aŭtobiografia fragmentaro, kunligita per maldika fadeno de kronologio kaj profesia evolado, el la vivo de eksponisto aŭ, kiel preferas diri Rossetti mem, bazarulo. "Vik" Rossetti vendas senakvajn kuirilojn kaj foje aliajn varojn, komence al individuaj dommastrinoj ĉe la pordo, poste ĉefe en foiroj. Li portretas plurajn homojn renkontitajn sur la vaga vivo-vojo; rakontas amuzajn travivaĵojn; elpensas diversajn originalajn stimulojn al aĉetemo. La libro interese pri-skribas multajn el la artifiko, blagoj kaj truko de bazaruloj kaj enhavas interesajn detalojn pri la nescienca, sed ofte observema psikologia studado en ilia metio. Inter aliaj interesaĵoj estas lia prezentado de "telepatio" (per diversaj kodoj kaj blufoj) kun sia edzino Liza. Li portretas sin mem kiel homon, kiu pasie deziras esti sendependa kaj ne labori por aliulo; kiu estas eksterordinare energia, aplomba, sprita kaj elturniĝema, kun granda talento por aktorado, bazara oratorado kaj mistifikoj; rapidpensa, timinda pro repliko-kapablo; tre societema, flirtema, bonkora, kaj

esence honesta kaj justema. "Vik" estas unu el la plej vivantaj karakteroj el la Esperantaj romanoj, proksimume same vive kredigita kiel la plej bonaj de Julio Baghy. Rossetti ne insistas pri Esperanto, sed kelkfoje mencias ĝian utilecon; estas notinde, ke preskaŭ ĉiuj ĉapitrotitoloj estas aŭ frazoj el la *Proverbaro Esperanta* aŭ aludoj al Esperantaj verkoj, kiel ekzemple "Konstante Frapante", "Anstataŭa Edzino", "Per flugiloj de Facila Vento"; tiuj ĉi aludoj kutime havas amuze neatenditajn aplikojn. Aparte menciinda estas la 13a ĉapitro, malsentimentala bildo de Esperanto-grupo en "Plurtown" ("Pluraj urboj"), akra kaj ne vaste troigita satiro kontraŭ tiu speco de loka grupo, kiu malpropagandas Esperanton: "La aĉa prononcado, la manko de viveco kaj esprimkapablo, la malmulteco de Esperanta parolado, la "buŝado" pri la Interna Ideo — dum mankis ĉia ideo pri la esenco de la lingvo: ĉio pezis mian koron." En la satira sonĝo, kiu sekvas, iu riproĉas lin: "Vi paroŭlas pe nejpaadoŭnebla fremda-rakcentoŭ. Vi ĉiam proŭnoŭncas la r." Liaj kritikoj pri fuŝesperantistoj pli efikas per sia loko inter multaj aliaj anekdotoj, spritaj troigoj kaj ekzemploj de homa neracemo kaj absurdeco.

Tamen, la ĉefaj meritoj de *Kredu min, Sinjorino!* por Esperanto estas literaturaj kaj stilaj. Ĝi estas artverko, facile legebla sed ne naiva; cele kaj stile malpeza, ĝi estas, malgraŭ humuraj troigoj, bona specimeno de viva realismo, konvinke prezentanta etoson kaj medion fremdan al la plimulto de la legantaro. Stile ĝi estas modelo de lingva korekteco kaj natureca fluado de la frazoj; ĝi plene montras Esperanton kiel modernan vivantan lingvon kun eblecoj de vera konversacia stilo, kreita per multaj lerte elpensitaj parolturnoj. Jen kelkaj etaj ekzemploj de la vivanteco kaj ĉiutageco de la konversacia stilo:



Cezaro Rossetti (1901-1950): Nur unu verko, sed elstara.

¹⁾ *Kredu min, Sinjorino!*, Scheveningen: Heroldo de Esperanto, 1950. Represo: Londono: SAT en Britio, 1974.

"Ĉu vi flaris la tekruĉon? De kie en la mondo vi venis, vagulaĉo?"

"Venu, Margy, ni iras falĉi niajn viktimojn. Do, ĝis revido en la almozulejo!"

"Ha, jen venas du el la embuskuloj. Hola! Mark – Bert – el kiu foiro vi estis forpelitaj? Venu ĉi tien, filoj de hunjo!"

"Do? 'mi demandis sugestie.

'Do? 'ŝi eĥis ĉarm-hontente.

'Do! 'mi diris decide.

Ni ne iris al la kino tiun vesperon."

"Kuirilojn? Certe. Mi vendas ĉion. Ne kreskas fungoj sur Martin Vernon. Se vi volas helpanton, mi prezentas al vi la unuan ŝancon profiti per mi. Kion vi diras? Mi sponos tiujn kuirilojn, kaj vi bezonos nur krajonaĉi mendojn en la libro tiel fulme, ke via krajono brulos."

Kvankam aparta merito de Cezaro Rossetti estas tiu ĉi natureca konversacia stilo, la priskribaj kaj rakontaj

partoj de lia libro estas same plenaj de vivigaj parolturnoj kaj lerte koncizaj frazoj. Oni ofte sentas, ke li profunde eniris la esencajn eblecojn de vere zamenhofeca Esperanto, kaj uzas ĝian liberecon por krei novajn trafaĵojn el konata lingvomaterialo. Kiel Esperanta prozisto li troviĝas stile sur la nivelo de Reto Rossetti kaj Raymond Schwartz; eĉ Julio Baghy nur margene superas lin. Lia libro estas ankaŭ unu el la plej taŭgaj en nia literaturo kiel progresiga legmaterialo por postkomencantoj eble ne nature literaturamantaj.

Ĝin tradukis: en la hungaran, Sándor Szathmári; en la polan, Jerzy Grum; en la japanan, Tosiro Kawai kaj en la anglan Reto Rossetti. La hungara libro, kun 19 bildoj, rapide disvendiĝis; la aliajn tradukojn, inter kiuj la japana havis novajn bildojn de japana artistino, oni ankoraŭ ne aperigis.

Marjorie Boulton

LA LINGVO:

Ĉu -ia aŭ simple -a?

TROVANTE en nia gazetararo ĉe certaj adjektivigoj pli kaj pli ofte la finaĵon -ia (jugoslavia folkloro, ses kroataj urboj, arabiaj landoj, aŭstria imperio, skandinavia trajnvojaĝo al Hamburgo, demokratia respubliko ktp.), oni vole-ne-vole demandas sin: Kial tiu -ia?

Kial ne simple jugoslava folkloro, ses kroataj urboj, arabaj landoj (same kiel araba lingvo), aŭstra imperio, skandinavia trajnvojaĝo (same kiel skandinava mitologio), demokratia respubliko? Ĉar la afero ŝajnas esti neklara, ni iom analizu ĝin.

1. El popolnomoj kaj radikaj landnomoj ni devenigas adjektivojn same kiel el aliaj substantivaj radikoj: angla lingvo (=lingvo de la angloj), franca kulturo, germana literaturo, rusa historio, itala muziko, islanda verkisto, egipta mumio. Sekve ankaŭ aŭstra ŝilingo, ĉeĥoslovaka antologio, jugoslava filmo, kroata urbo, arabaj landoj (=landoj de araboj), skandinavia trajnvojaĝo (Vojaĝas ja skandinavo, ne Skandinavio!). En la lasta okazo ni povus ja diri ankaŭ "trajnvojaĝo el Skandinavio al Hamburgo". Koncerne la historian aŭstran resp. aŭstran imperion dependas de tio, ĉu ni prenas kiel bazformon la popolnomon aŭstro aŭ landnomon Aŭstrio (ĝia enloĝanto estas sekve aŭstriano).

Ni povas diri kaj angla ĉefministro, franca registaro, norvega reĝo, sveda parlamento, finna prezidanto, kaj (pli solene) ĉefministro de Anglujo, registaro de Francujo, reĝo de Norvegujo, parlamento de Svedlando, prezidanto de Finnlando. Eblaj estas ankaŭ angluja aŭ prefere Angluja (same kiel Zamenhofa formo, Esperanta lernolibro, Londona nebulo, Kopenhaga kongreso, ne: zamenhofa ktp.) ĉefministro, Norveguja reĝo, Finnlanda prezidanto. La sama estas la rilato inter jugoslava ~ Jugoslavia, ĉeĥoslovaka ~

Ĉeĥoslovakia, estona ~ Estonia. La ia-formojn, kiuj sonas cetere malpli bele, ni uzu nur kiam la senco tion nepre postulas. Ekz. estona gazetararo estas estonlingva, dum la Estonia inkludas ankaŭ rusajn k.a. gazetojn. Estono apartenas al la estona nacio, estoniano povas esti ankaŭ ruso, latvo, armeno ktp., kiu loĝas en Estonio.

2. Ni diras demokrata (=karakterizata per la radiko **demokrat**) pensmaniero, demokrata organizaĵo, en vere demokrata maniero, demokrataj rajtoj, demokrata sistemo, reĝimo, konstitucio, ŝtatordo, lando, demokrateco de UEA, demokratigo kaj demokratiĝo, socialdemokrata partio, sed aliflanke en konekso kun respubliko ĉiam estas uzata la derivaĵo demokratia: Germana Demokratia Respubliko (tamen en "Heroldo de Esp.", n-o 13, 1974, Germana Demokratia Respubliko), Vjetnama Demokratia Respubliko, Korea Popoldemokratia (eĉ "Popol-demokratia" kaj "Popol-Demokratia") Respubliko. Kvankam tiu formo estas logike pravigebla (karakterizata per demokratio; kie regas demokratio), ĝi rompas la unuecon. Same logika, krome pli mallonga kaj belsona estas la formo demokrata resp. popoldemokrata respubliko.


3. Al alia kategorio apartenas la nomoj de la sciencoj kun la finaĵo -io: filozofia sistemo, filologia fakultato, geografiaj nomoj, geologia epoko, geometria figuro, psikologia milito, psikiatria hospitalo. Tamen la fleksebleco kaj nuancriceco de Esp. ebligas ankaŭ tiajn malofte uzeblajn esprimojn kiel ekz. filozofa kongreso = kongreso de filozofoj, psikiatra hospitalo = hospitalo, kie estas kuracataj psikiatroj (!). Krome, anst. geografo, geometro ktp. ni povas konstrui eĉ la derivaĵojn geografiisto, geometriisto ktp.

Kun ili certgrade kongruas ankaŭ la vortparo diplomatio – diplomato: diplomaciaj rilatoj, diplomatia skandalo, sed diplomata kvartalo (kvartalo de diplomatoj; kvartalo, kie loĝas diplomatoj), diplomata kunveno, diplomata ago, diplomata karaktero.

H. Seppik

NEJ kaj ĝiaj vidbendaj programoj

"JUNULOJ PLEJ BONE varbas aliajn junulojn". Tiel deklaris foje reklamslogano de TEJO. Tamen, mont-rigas, ke la informado kaj entuziasmigo de junuloj pri Esperanto estas unu el la plej malfacile plenumeb-laj taskoj. Lastatempaj iniciatoj de Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) aŭguras seriozajn paŝojn por esplori novajn informmetodojn. En la NEJ-semajnfino, de la 29a ĝis la 31a de oktobro 1976, en Ede, programeroj estis filmitaj sur vidbendon por produkti reklamfilmon pri la evento. Tiel, neĉeestintoj poste povos vidi la kastelon "Hoekelum", admiri la delikatecon de la pap-



erfaldada arto de f-ino Mikiko Mimori, ĝui teatraĵetojn, aŭskulti fragmenton el la diskuto pri migrobirdoj, kon-stati la plurnaciecon de la "Asterix" traduk-grupo kaj kaŝaŭskulti intimajn konversaciojn. Kompreneble, ĉiuj kun granda scivolo (vidu la foton) tuj gapi al la ĵus registrita programo, kiam oni per televidilo montris ĝin.

546 jarojn poste

33a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
Junulara Esperantista Franca Organizo,
4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio

LA UNIVERSITATO en Poitiers fondiĝis en 1431, dum la centjara milito. Jen unu el la interesaj faktoj ĉerpeblaj el la ĵus aperinta informilo kaj aliĝilo por la 33a Internacia Junulara Kongreso (IJK), okazonta en tiu franca urbo de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1977.

La kongreso, 546 jarojn post tiu fondiĝo, gastos en la universitata kvartalo, iom for de la urbo, sed ligita al ĝia centro per aŭtobusoj. La partoprenantoj loĝos en unulitaj ĉambroj en studenta domo, cent metrojn for de la kongresejo, apud memserva studenta restoracio.

La urbo mem havas 100 000 loĝantojn, troviĝas 330 km sudokcidente de Parizo kaj estas facile atingebla per ŝoseoj kaj fervojoj.

La elektita kongrestemo, "Problemoj de organizado kaj disvolviĝo de la esperantistaj junularaj movadoj", donos eblecon involvi pli da kongresanoj en komunan kaj konkretan planadon. Krome, KER entreprenas paŝojn realigi en la kadro de la Kongreso seminarion, kun verŝajna titolo "Regionaj lingvoj kaj kulturoj". Ĉiuj kutimaj IJK-programeroj okazos ankaŭ en Poi-tiers. Tamen, pliaj proponoj estas bonvenaj. Oni anoncu tiujn al la kongresa adreso (v. ĉi-supre). Ĉe tiu adreso oni akceptas ankaŭ la aliĝilojn kaj kotizojn. Tarifo:

Aĝo de la kongresano	Antaŭ 1976 12 31		Antaŭ 1977 03 31	
	F.f.	Gld.	F.f.	Gld.
malpli ol 18 j.	315,00	157,50	335,00	167,50
18 - 21 j.	330,00	165,00	350,00	175,00
22 - 25 j.	345,00	172,50	365,00	182,50
26 - 29 j.	370,00	185,00	395,00	197,50
pli ol 30 j.	400,00	200,00	425,00	212,50

Individuaj membroj de TEJO/UEA ĝuas rabaton de 25 francaj frankoj (12,50 gld.).

Poŝtĉekkonto: 31 709 94 Y, La Source, por JEFO.

La kotizojn oni, kompreneble, povas pagi ankaŭ pere de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Poitiers, urbo kun centra rolo en dumiljara historio, arkitekture fascina; regiono riĉa je monumentoj, fama pro vinoj kaj fromaĝoj, — jen pli da elĉerpaĵoj el la informilo. Por formi pli kompletan bildon, prefere legu la informilon (kun la aliĝilo), kiu estas nun dis-tribuata. Ekzempleroj mendeblaj de la kongresa adreso.


Ĉu solvo en Israelo?

LA MANKO de gejunuloj en la Movado forte sentiĝis ankaŭ en Israelo. Mankis ne unu sed du generacioj, kiel raportas la septembra numero de *Israela esperantisto*. Tamen, dum la lastaj jaroj la situacio grave ŝanĝiĝis. Tute subite gejunuloj preskaŭ ĉefrolas en la israela Movado. Oni ligas ĉi tiun pozitivan evoluon al koresp-onda kurso, kiun antaŭ kelkaj jaroj verkis kaj gvidis s-ino Anat Zduńska-Zajdman, mem apartenanta al tiu juna generacio. Baldaŭ poste, la korespondan kurson transprenis alia juna homo, Josef Ŝemer, kiu akceptis ankaŭ administri la laborojn de Esperanto-Ligo en Is-raelo (ELI), ĝia junulara sekcio (JELI) kaj ĝia periodaĵo *Israela esperantisto*. Plia junulo, Moŝe Ben Porat, ek-gvidis kursojn kaj organizis sukcesan internacian labor-tendaron (v. nian revuon, februaro 1976, p. 34). J. Tileman animis la laboron en la nordo de la lando, kaj A. Wandel organizis la viziton de granda israela grupo al la internaciaj kongresoj en Ateno kaj Tesaloniko (entute 23 personoj). Gejunuloj sukcesis penetri ankaŭ en la israelajn radion kaj televidon (Wandel, Ŝemer kaj Zajdman) kaj organizis standon ĉe studenta foiro.

Lanti — la serĉanto

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanio):

Vivo de Lanti, de E. Borsboom. Parizo: SAT, 1976.
273p. Ilus. 19cm. Broŝ.



Eŭgeno Lanti

Fine aperis la biografio de Lanti, la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). La scivolon, kiun oni sentas, eklegante priskribon de la vivo de unu el la plej elstaraj movadagantoj, tiu ĉi libro plene kontentigas — per multaj interesaj detaloj pri la persono, kiujn la aŭtoro prezentas surbaze de riĉa fontmaterio, kiel ankaŭ per aŭtobiografia skizo de Lanti mem, kiu estas presita kiel aldono.

Vivo de Lanti — tio ĉi estas grandparte ankaŭ la historio de SAT. Borsboom amplekse traktas la evoluon de tiu organizaĵo kaj la politikajn batalojn, kiuj kondukis al la foriro de la komunistoj el SAT komence de la 1930'aj jaroj. Li klopodas esti justa al ambaŭ partioj, eĉ al Drezen, la gvidanto de la sovetaj esperantistoj kaj ĉefa kontraŭulo de Lanti. Prave Borsboom parolas ne simple pri "skismo", sed pri "metamorfozo", kiu ekk okazis en SAT en 1928-31.

Tiu ĉi transformiĝo de SAT ne estas komprenebla, se oni ne konsideras ankaŭ la ŝanĝojn, kiuj okazis en la penso de Lanti mem. Li, kiu estis unue anarkisto, poste membro de la Franca Komunista Partio, kreis SAT sub la devizo, ke per Esperanto necesas batali por la revolucio — ke la lingvo estu ilo en la manoj de la proletaro. Tiun devizon Lanti komencis modifi, kiam li perdis — sub la impreso de la formiĝanta stalinismo — sian komunisman kredon. Jam ekde 1927 li pli forte emfazis la t.n. sennaciismon kiel apartan doktrinon, estonte adoptotan de SAT, tiel distanciĝante de la supertendenca karaktero, kiu estis la ĝistiam principo de la asocio. Samtempe Lanti akcentis la gravecon de Esperanto por la kreiĝo de tiu sennaciismo — eĉ tiom, ke Borsboom konkludas pri transformo de SAT el peresperanta en poresperantan organizaĵon.

La enhavo de sennaciismo ĉiam restis nebula (laŭ Borsboom, ĝi "celas la malaperigon de ĉiuj nacioj kun enkonduko de unueca lingvo, mezurilaro kaj kalkulilaro") — kaj tio kaŭzis, ke ne nur komunistoj, sed ankaŭ multaj alitendencaj SAT-anoj, inkluzive la socialdemokraton Franz Jonas, skeptike reagis je la novaj ideoj de Lanti. Parte pro tiu kritiko el la propraj vicoj, Lanti en 1933, ĵus energie defendinte la unuecon de SAT kontraŭ la kalumnioj kaj maldecaj metodoj uzataj de liaj malamikoj, rezignas pri la gvida funkcio en la asocio kaj preferas propagandi sian ismon en la kadro de aparta frakcio.

En 1936 Lanti forlasas Eŭropon por ĉiam, li migras tra la mondo, nenie trovas ripozon, pli kaj pli izoligas. Li daŭre strebas al sennaciismo, sed fine tranĉas eĉ tiun ligon, kiun ĝi ankoraŭ tenis kun la origina celo de SAT: nome la klasbatalan fundamenton de sennaciismo, la sinapogon je la "sennacieca" proletaro. Esperanto sola postrestas en lia menso kiel revolucia rimedo, se ne la plej grava, almenaŭ la plej kara. Li volas "idee tuj salti" al sennaciisma mondordo, sed neglektas realece montri kiel atingi tiun celon. Serĉante konfirmojn por la praveco de siaj ideoj, Lanti tro facilanime subŝovas pozitivan karakteron eĉ al la "sennaciiga" politiko de Stalin aŭ al la internacia kunplektiĝado de kapitalismo. Li laŭdas la precizecon kaj produktemon de germanoj kaj japanoj, riverencas al la "sankta Monto Fuji" kaj malkovras sian inklinon al azia mistikismo. Li serĉadas celon de la vojaĝo kaj la celon de sia ekzisto, estante pli kaj pli turmentata de tre doloriga kap-tumoro. Komence de 1947 Lanti memmortigas sin en Meksiko.

Borsboom atentokapte priskribas la etapojn en la vivo de Lanti ĝis la tragika fino. Li ne adorsterniĝas antaŭ la persono, kies konturojn li provas pliklarigi. Montritaj estas la malfacila karaktero de Lanti, lia nekapablo longtempe kunlabori kun aliuloj, la seniluziigo, kiun al li, iam arda komunisto, donis la evoluo en Soveta Unio sub Stalin, kaj la mirige ambiguaj trajtoj de lia penso.

Tamen, Borsboom preterlasas resume juĝi pri la nekontesteblaj meritoj de Lanti kaj pri la objektiva signifo de lia sennaciismo. Tiu tasko restas ankoraŭ farenda. La recenzanto mem konfesas la miksitajn sentojn, kiujn la tie ĉi portretita persono postlasas ĉe li: Unuflanke, Lanti estis bona eseisto kun admirinda stilo, kapabla organizanto, homo, kiu post la Unua Mondmilito ŝiris la movadon el ĝia neŭtralisma letargio. Aliflanke tamen, la sama persono poste transformiĝis en sektecan predikanton, kiu sian klarvidon oferis al utopiaj revoj. La lantia sennaciismo eble ankoraŭ atendas sian teoriant rafinant — en sia nuna formo ĝi, se pli vaste akceptita, montriĝus fatala ne nur por SAT, sed por la tuta publika bildo de la Esperanto-movado. Tial por ni, kiuj hodiaŭ pene baraktas por progresigi Esperanton per etaj paŝoj, ne per "ideaj saltoj", Lanti prefere okupu lokon nur en la historio.

Prezo: 30,60 (por Nederlando 31,82) gld., plus sendokostoj 10%.

Duoblaĵo

Recenzas Tazio Carlevaro (Svislando):

Nia originala prozo, de H. Apolloner. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 58p. 20cm. ISBN 87 85020 907.

La Esperanta kulturo troviĝas videble en identeco-krizo. Plej diversmaniere ĝi klopodas trovi novajn elementojn, kiuj iĝu partoj de propra sinkompreno, kaj ellabori malnovajn elementojn, tiel ke ili povu plu roli en tiu nova sinkompreno. Ne multaj analizis ĉi tiun situacion: iuj sentas ion, tamen, kaj proponas fronti ĉi tiun krizon per tute tradiciaj rimedoj. Mi supozas, ke la aŭtorino de ĉi tiu verko sekvas ĉi-lastan vojon. *Nia originala prozo* estas fakte kompilaĵo, kies aktualecon mi ne komprenas tute. En 1974 aperis verko, kiu tiurilate reprezentas definitivan kompilaĵon: temas pri *Esperanto en perspektivo*. Ĉiu tiuforma libro ne povas ne esti, post ĝi, simpla duoblaĵo. Mi supozas, ke multe pli utilaj estus verkoj pri la disvolviĝo de la Esperanta kulturo kaj monografioj pri unuopaj verkistoj aŭ verkoj.

La aŭtorino prezentas en du ĉefĉapitroj unue la prozan verkaron de Zamenhof, poste la prozaĵojn de aliaj aŭtoroj. Tiu ĉefĉapitro dividiĝas laŭ mallongaj prozaĵoj kaj, aliflanke, romanoj kaj biografioj. Ĉiu verko kaj ĉiu aŭtoro estas akompanata de tri-kvarvorta (malofte pli longa) prezento. Ne troviĝas tie fundamentaj forgesoj aŭ flanklasoj. Tamen multaj prijuĝoj estas senkaŭze flataj, aliaj senkompare neniondiraj, iuj, fine, nesufiĉe encentrigas la signifon de la verkisto pritraktata. Pri tio eble kulpas la sintezeco de la frazoj kaj la naturo mem de la verketo.

Tamen, ankaŭ tiu verketo povas esti utila, se iu ne volas alfronti la pli ampleksan *Esperanto en perspektivo* (el kompilaĵa vidpunkto), kaj la kritike valoran *Gvidlibro al supera ekzameno - II*.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) gld. plus sendokostoj 10%.

Fascina libro

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Mein geliebtes Esperanto / Mia amata Esperanto, de Richard Schulz. Gerlingen-Stuttgart: Bleicher Verlag, 1976. 215p. 19cm. ISBN 3-921097-14-2.

Nekutima, fascina libro, kiu legiĝas kiel aventura romano. Kia aventuro? Esploro de 'fremda' lingvo kaj 'fremda' kulturo, kiuj estas Esperanto kaj Esperantujo. Ĝi estas nek lernolibro, nek sociologia studo pri la E-movado. Sed, sen tedi, ĝi donas al la legantoj amason da informoj pri la lingvo kaj ĝiaj parolantoj. Se vi havas germanlingvan amikon, kiu estas iom libro-ama kaj filozofi-ema, donu al li ĉi tiun libron. Li lernos multe pri Esperantujo, kaj se li atente legos ĝin, post fino li eĉ kapablos legi E-on. (Eble li eĉ sukcesos dige-

sti la Kleist-an novelon per kiu, en E-o, finiĝas la libro). La kelkaj eraretoj, kiuj enŝteliĝis en la multaj E-fragmentoj, ne-esperantistan leganton supozeble ne ĝenos. Por nunaj kaj iamaj esperantistoj la aŭtoro donas proponojn por praktika utiligo de la lingvo. Proponoj ne ĉiam novaj (ekz. en Nederlando la telefonĉeloj jam de jaroj estas provizitaj per E-teksto), sed la aŭtoro distingiĝas en tio, ke li faras ilin ĉefe al ne-esperantistoj por la profito de aliaj ne-esperantistoj. Kaj tiuj ja konsistigas la plej grandan parton de la 'merkato'.

Espereble la libro vidiĝos en multaj normalaj libro-vendejoj, kaj espereble multaj ekesperantistoj estos incititaj de ĝia titolo. Ĉar ĝuste ĉi tiu verkaĵo povus reaktivigi ekdormintajn E-parolintojn, kiel revekiĝis ĝia aŭtoro post longa sindeteno. Germanaj esperantistoj povas fari unuan paŝon por plenumi unu el la revoj de la aŭtoro: ili aĉetu/mendu la libron ne per libroservo, sed en sia normala loka librovendejo!

Prezo: 13,80 (por Nederlando 14,35) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Frazaro kaj notaro de Plena Gramatiko, Hukuta. Tokio: Asake-Syoboo, 1976. 187p. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Fundamentoj de psikologio, C.J. Adcock. Liège: SUK, 1976. 99p. Ofset.manuskripto. 30cm. Prezo: 18,— gld.

Insigno n-ro 26. Luksa, tridimensia verda stelo orumita, fiksebla per kluĉilo. 8mm. Prezo: 5,10 gld.

Internacia lingvo en eklezio kaj mondo, Jerzy Korytkowski. Roma: IKUE-Centro, 1976. 198p. 21cm. Nova ampleksa studo de la aŭtoro de *Ekumenismo kaj internacilingva problemo*. Prezo: 13,50 gld.

Nia originala prozo, H. Apolloner. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag. 58p. 20cm. Literaturhistoria skizo pri la Esperanta prozo originala. Prezo: 4,50 gld.

Pri informadiko kaj interlingvistiko. Red. H. Behrmann. Paderborn: Institut für Kybernetische Pädagogik, 1976. 92p. Mimeo. 29cm. Studoj de A. Münnich kaj I. Szerdahelyi. Prezo: 6,60 gld.

Pri la ponto Saidanbaŝi, La kordeziro por paco de japana patrino, J. Koide. Trad. el la japana M. Niŭa. Nagoja: 1976. 25 + 9p. Ilus. 18cm. Historia rakonto pri la fama ponto. Prezo: 3,30 gld.

Senlingvulo, La, V.G. Korolenko (1853-1921). El la rusa trad. (1922) M. Ŝidlovskaja. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976 (3a eldono). 191p. 20cm. Romano, kiu apartenas al la klasikaĵoj de la Esperanta traduka beleto. Prezo: 11,10 gld.

Sprachwissenschaftliche Überlegungen zur Frage der leichten Erlernbarkeit des Esperanto, Max Mangold. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 1976. 11p. 21cm. Prezo: 1,02 gld.

Turista kantaro. Pécs: Monda Turismo, 1976. 84p. 20cm. 51 kantoj tradiciaj kaj popolaj, kun muziknotoj. Prezo: 7,50 gld.

Vivo de laboristo en la kolonia kaj novkolonia epokoj, J. van Munster. Amsterdam: la aŭtoro, 1976. 112p. 21cm. Historiaj kaj personaj memoraĵoj. Prezo: 3,— gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

62a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Rejkjaviko (Islando) 1977 07 30 – 08 06

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la LKK: Pósthólf 1081, Reykjavík.

Profesoroj ne prokrastu

Proksimiĝas la limdato por sinanoncoj por la 30a sesio de la Internacia Somera Universitato en Rejkjaviko. Universitataj profesoroj kaj aliaj personoj kun la necesaj kvalifikoj estas petataj atenti la limdaton: la 15an de januaro 1977 (v. nian novembran n-ron, p. 194).

Forĝi feron ...

Por forĝi la feron de la publika interesiĝo, dum ĝi (espe-
reble) estos varmega, Islanda Esperanto-Asocio jam planas eldoni en islanda versio la lernolibron de Wells "Jen nia mond'!". Tiu kurso, verkita speciale por radio, estis elsendita de 15 britaj universitataj radio-
stacioj en la aŭtuno de 1976.

En oktobro aperis ampleksa (5-kolumna) artikolo pri Esperanto en unu el la rejkjavikaj ĵurnaloj *Thjóðviljinn*. Verkis ĝin UEA-membro en la norda urbo Akureyri, Jón Hafstein Jónsson.

Infanoj tre bonvenaj!

Post la bedaŭrinda nuligo de la pasintjara Infana Kongreseto en Ateno, la organizantoj de la ĉi-jara kongreseto faras grandajn fortostreĉojn por varbi sufiĉan nombron da partoprenantoj kaj tiel certigi la sukceson de tiu unika kaj eksterproporcie grava kunloĝado de esperantlingvaj infanoj. La aliĝkosto estos kiel eble plej modesta. Dank' al la malvarmo de multaj personoj, kiuj ĉiujare donacas al la kaso "Adoptaj Gepatroj", la Kongreso povas proponi subvencion de 200 guldenoj por pagi parton de la vojaĝkostoj de ĉiu infano, kiu partoprenos la Infanan Kongreseton. La aĝlimoj estas 6 kaj 13 jaroj. Pliaj detaloj aperos kiel kutime en la Dua Bulteno. Por infanoj sub la aĝlimo de 6 jaroj estas esplorata la ebleco organizi vartejon dum la tuta daŭro de la Universala Kongreso. Kongresan(in)oj, kiuj mem estas spertaj en infanvartado kaj kiuj pretus helpi, estas invitataj anonci sin al la konstanta adreso de la UK.

Oficiala Antaŭkongreso — en Skotlando

En la universitata urbo Stirling — ĉ. 30 km de Glasgovo kaj ĉ. 50 km de Edinburgo — okazos sub aŭspicio de UEA Oficiala Antaŭkongreso de mardo, la 26a de

julio, vespere, ĝis sabato, la 30a de julio, matene. Flugkaravano el Glasgovo portos la partoprenantojn rekte al Rejkjaviko ĝustatempe por la komenco de la Universala Kongreso. La antaŭkongresanoj loĝos kaj kunvenos en la Universitato de Stirling. Detaloj pri aliĝo kaj prezoj sekvos kiel eble plej baldaŭ. Cetere, en la sama semajno okazos en Skotlando ankaŭ la kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).

Flugkaravanoj en preparo

Du karavanoj jam fiksas siajn prezojn por la vojaĝo al Rejkjaviko. Kontraŭe al la informo en la antaŭa komunikado, Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj) nun proponas flugon ekskluzive de hotelo. Ekflugo la 29an de julio, revendato individue elektebla. Prezo 1495,— danaj kronoj. Eblas je tiu sama prezo komenci la vojaĝon en Kopenhago, Stokholmo, Oslo aŭ Helsinko. Alian eblecon el Oslo proponas Turisma Servo de Norvega Esperanto-Ligo (Boks 942, Oslo 1), kontraŭ 1090,— norvegaj kronoj. Por la pli sudaj eŭropaj landoj estas ankoraŭ esplorataj la eblecoj el diversaj urboj laŭ diversaj kondiĉoj. Prezoj sen hotelo por irrevena flugo ĝenerale estos ĉ. 600 gld. Precizaj informoj aperos kiel eble plej baldaŭ.

Eblos loĝi malmultekoste

Por tiuj kongresanoj, kiujn timigas la islandaj hotelprezoj (ĉ. 40-90 gld. por ĉiu nokto kaj persono), LKK diligente esploras aliajn, malpli kostajn loĝeblecojn. Gejunuloj povos loĝi en junulargastejo kontraŭ ĉ. 10 gld. por ĉiu nokto. Krome estos nepre aranĝitaj ankaŭ amasloĝejoj en lernejoj, verŝajne ne pli koste, ol la junulargastejo. Detaloj kun definitivaj prezoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno.

Pluraj Postkongresaj aranĝoj

Pro la limigita nombro de hotelĉambroj en kelkaj el la plej vizitindaj turismaj lokoj, jam estas certe, ke devos okazi pluraj samtempaj postkongresaj aranĝoj. Inter aliaj ideoj konsiderataj estas 3-4-taga flugo al Gronlando kaj ekskurso al la nordislanda urbo Akureyri, kun la proksima lago Mývatn. La fina elekto estos baldaŭ farita, kaj detaloj aperos en la sekva komunikado.

Jam kvarcent aliĝoj

La nombro de aliĝintoj al la rejkjavika UK jam atingis 400 (pasintjare nur 200), el 38 landoj. Jen laŭlanda resumo: Arg. 1, Aŭstral. 9, Aŭstr. 4, Belg. 12, Braz. 3, Brit. 20, Bulg. 5, Ĉeĥosl. 3, Danl. 18, Egipt. 2, Finn. 18, Franc. 61, FR Germ. 52, Grek. 1, Hisp. 10, Hung. 7, Irl. 1, Isl. 17, Isr. 2, Ital. 11, Jap. 10, Jug. 8, Kan. 6, Luks. 5, Malagasa Resp. 1, Meks. 1, Ned. 42, Norv. 7, Nov-Zel. 1, Poll. 7, Portug. 3, Sov. 1, Sud-Afr. 1, Sved. 20, Svis. 11, Us. 16, Venez. 2, Zair. 1.

Hungario

• Laŭ la revuo de Hungara Esperanto-Asocio *Világ és nyelv* (Mondo kaj lingvo), n-ro 5/76, 140 hungaraj parlamentanoj direktis proponon al la prezidanto de parlamenta komisiono pri kulturo, petante starigon de aparta instanco, kiu studu la eblecojn por adopti komunan internacian lingvon. Laŭ la propono, tiu nova komisiono konsistu el parlamentanoj kaj fakuloj pri la monda lingvo-problemo.

Sudameriko

• En la n-ro 18 de la regule aperanta bulteno de Brazila Konsilantaro de Esperanto, oni i.a. povas legi, ke dum la lasta Brazila Seminario de Esperanto estis decidite, ke en la jaro 1978, en Marilja (San-Paŭlo), okazu la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto. En Brazilo oni tion konsideras kiel parton de preparoj por eventuala okazigo de la 65a UK en 1980, por kio kandidatiĝis la brazila ĉefurbo Brazilio.

Italio

• Post tre vasta publika informado kaj impona inaŭguro, la 27an de oktobro komenciĝis en Modena nova Esperanto-kurso (53 kursanoj), kiun gastigas la tiea komerca ĉambro.

• Sekve de la sukcesa pasintjara Itala Kongreso de Esperanto en Triesto, la loka societo atingis, ke ekde oktobro 1976 en la semajna urba gazeto *Avvenimenti - La Città* regule aperados rubriko pri Esperanto. Pere de la rubriko esperantistoj estos ĝustatempe informataj pri movadaj novaĵoj, dum la neesperantista legantaro lernos ion pri Esperanto.

Hispanio

• En sia kongreso, okazinta en Madrido inter la 9a kaj 12a de oktobro 1976, la Hispana Socialista Laborista Partio unuanime aprobis jenan rezolucion: "Por ke estu vera interkompreno kaj frateco inter la laboristaro, oni bezonas, ke la homoj povu rilati senpere. Tial oni konsilas, ke ĉiuj socialistaj partioj de la tutmondo adoptu Esperanton por la internaciaj rilatoj, kiel lingvon de la laborista klaso."



Peruo: Ni jam kelkfoje aludis pri la ekzisto de relative granda nombro da junaj esperantistoj en ĉi tiu sudamerika ŝtato. Pruvon pri tio sendis al ni la ĉefa aganto en tiu lando, s-ino J. Skotte, kiu ĉi tie pozas inter siaj gelernantoj.

Ĉeĥoslovakio

• La 21an de oktobro, la unua programo de la ĉeĥa televido elsendis 8-minutan koloran raportaĵon pri Esperanto. En la programo, elsendita je la 6a horo vespere kaj vidita de pluraj milionoj da spektantoj, parolis d-ro Jermář, V. Kvasničková kaj Z. Křimský.

Japanio

• *Esuperanto kirinuki-tyô* (Kolekto de eltondaĵoj pri Esperanto) estas bulteno, kiun ĉiumonate eldonas Japana Esperanto-Instituto. La bulteno konsistas el materialoj aperintaj en la nacilingva gazetaro. Similan bultenon eldonadis antaŭe UEA, sed ĝi havis internacian karakteron.

Lingvoj

• "Miloj da volontuloj kaj komunumaj dungitoj, per farbo kaj penikoj, dum la lasta monato forviŝis la publikajn skribaĵojn en la franca lingvo ankoraŭ ekzistantajn en Alĝero: stratnomojn, vendejajn ŝildojn, nomojn de publikaj oficejoj. La operacio estas nomata 'arabigo de la loĝmedio'" (Laŭ *Il messaggero* de 76 11 01, citita en elsendo de Radio Romo).

• La 10an de oktobro 1976, en la friula vilaĝo Manzano (nordorienta Italio), dum sporta evento favore al la viktimoj de la antaŭnelongaj tertremoj en tiu regiono, la itala poŝto uzis memorigan stampon en la friula lingvo "par dà une man ae int furlane a tornà come prim" (por helpi la friulan genton reĝi kiel iam). Verŝajne estas la unua fojo, ke itala publika instanco oficiale uzas la friulan, parolatan de la plejmulto de la friula loĝantaro (v. niajn oktobran kaj novembran numerojn, paĝoj 172 kaj 183).

Prelegvojaĝoj

• Dum dusemajna rondveturo tra FR Germanio (de la 20a de oktobro ĝis la 4a de novembro 1976), s-ro Jerzy Grum, redaktoro de Esperanto-programoj de Radio Varsovio, faris 13 paroladojn en Esperanto-kluboj. Li prelegis pri la pola kulturo kaj pri la funkciado de la Esperantaj elsendoj de la Pola Radio. La prelegvojaĝon financis Germana Esperanto-Asocio kaj la kluboj en kiuj s-ro Grum parolis.

• S-ro Stefan MacGill, estrarano de TEJO kaj volontula laboranto en la CO de UEA (i.a. li kompostas kaj enpaĝigas nian revuon), inter la 18a kaj 28a de oktobro faris prelegvojaĝon tra Francio. Parolante pri pluraj temoj (Nov-Zelando, Japanio, E-instruado ktp.), li vizitis 10 urbojn kaj 13-foje prelegis al ĉ. 400 personoj.

Periodaĵoj

• Okazas io en la pacifika regiono! Antaŭ kelkaj monatoj atingis nin la

unuaj numeroj de *Pacifika esperantisto*, monata cirkulero, kiu verve pledas por kunlaboro ĉefe inter la nordamerikaj esperantistoj. Ĝin redaktas s-ro Zoran Tušanov (2131 Pandora 308, Vancouver, B.C., Kanado V5L 1N4). Nun venas la unua numero (aŭtuno 1976) de *Pacifika lumturo*, 28-paĝa, tekste modesta sed bonaspekta revu-
ciatita de grupo da japanaj esperantistoj, kiuj ariĝis ĉirkaŭ la redaktoro s-ro Kei Kurisu (Mogusa Dant. 1-4-1004, Hino-si, Tokio, Japanio 191). Ne mankas verve ankaŭ en *Pacifika lumturo*, precipe en plurpaĝa teksto de la redaktoro, kiu traktas kelkajn opiniojn esprimatajn en nia revuo (julio/aŭgusto 1975, p.127). Krome, enestas du interesaj kontribuoj pri la historio de la Esperanto-movado en Ĉinio.

- Laŭ *Bulgara esperantisto* 9/76, tiu periodaĵo atingis 6 000 abonantojn, kio vicigas ĝin inter la movadaj periodaĵoj kun la plej granda eldonkvanto.

Eldonaĵoj

- La kopenhaga eldonejo TK, kiu post mallonga sed brila aktiveco (*La Nobla Korano*, *Vole... novele*, *Kruko kaj Baniko*, *ABZ de amo*, *Struvel-petro k.a.*) ĉesis eldoni kaj vendis siajn stokojn al UEA, lastatempe montras signojn de reviviĝo. Jam estas kompostita 270-paĝa ĉefverko de la Esperanta prozo, *Metropoliteno* (1933) de Varankin (1902-); TK planas la reeldonon de la romano dum 1977. Estas interese menci, ke la kompostlaboro okazis per maŝino, kiu optike (komputile) legas la manuskripton kaj fotokompostas. Tio grave faciligas la kutimajn problemojn pri la Esperantaj supersignoj. Por la manuskriptoj por tia kompostado TK rekomendas la IBM-skribmaŝinon kun la literglobo "Elite library", US 1167069, kiu havas la supersignojn.

- Estona eldonejo Eesti Raamat ("Estonia libro") aperigis en 35 000 ekz. kolorbildan albumon *Tallinn*. Klarigaj tekstoj de la albumo estas paralele en ses lingvoj, inklude Esperanton. Baldaŭ aperos de la sama eldonejo en Esperanto la romano de la estona klasikulo A.H. Tammisaare *La mastro de Kõrboja* en dek mil ekzempleroj. La pli fruaj eldonaĵoj en proksimume samaj aŭ eĉ pli grandaj eldonkvantoj jam elĉerpigis aŭ estas baldaŭ elĉerpigontaj.

Konkursoj

- Post la forigo de la tradukaj branĉoj el la Belartaj Konkursoj de UEA, lastatempe okazis traktado inter Brita Esperanto-Asocio, Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kaj UEA por organizi en 1977 konkurson pri tradukoj el la anglalingva literaturo. ELNA jam konsentis kontribui trionon de la premia mono, dum nome de Britio tion faros la Londona Esperanto-klubo.

Informado

- Meze de ĉi tiu jaro, en la revuo *Desed* (n-ro 54), eldonata de la Banko de Brazilo, aperis plurpaĝa artikolo pri Esperanto, sub la titolo "Unu lingvo por la terglobo vilaĝo".

Literaturo

- En la volumo *Aktoj de la 6a Kongreso de la Internacia Asocio pri Kompara Literaturo* (paĝoj 503-507) aperis anglalingva studo de d-ro Humphrey R. Tonkin "Poetry in Esperanto: Is an International Literary Culture Possible?" (Poezio en Esperanto: Ĉu internacia beletra kulturo estas ebla?). La volumon eldonis Kunst und Wissenschaft, Stuttgart, FR Germanio.
- En la Esperanta sekcio de la literatura konkurso "Nova Eŭropo", organizita en Italio, la unuajn tri

premiojn gajnis laŭvice: Nicolino Rossi, Eli Urbanová kaj Julia Pioro. Laŭdan mencion ricevis J. Kořínek kaj Z. Heide. Estas interese, ke la Esperanta branĉo ĉi-foje portis la nomon de Kolomano Kalocsay. Krome, Carmel Mallia, esperantisto el Malto, gajnis la unuan premion en la franclingva branĉo de la konkurso.


Unesko

- Dum la simpozio de neregistaraj organizaĵoj, kunlaborantaj kun Unesko, pri kontribuo al establo de nova internacia ekonomia ordo, unu el la laborgrupoj havas en sia tagordo ankaŭ la eron "Lingvaj baroj je la nivelo de komunikado". La simpozio okazos de la 8a ĝis la 10a de decembro 1976 en la sidejo de Unesko en Parizo. UEA, kompreneble, reprezentigos ankaŭ en tiu kunveno.

Turismo

- **Turku/Finnlando, urbo kie ĉiam okazas io** — tio estas la titolo de la bela plurkolora esperantlingva prospekto, kiun jam la kvaran fojon eldonis la urba turisma oficejo (Käsityöläiskatu 4, SF-20 100 Turku 10, Finnlando). Ĝus aperis ankaŭ turisma prospekto pri Kanariaj Insuloj (Patronato de Turismo, Buenos Aires 6, Las Palmas de G.C., Hispanio).

Persone



Benczik

- La juna hungara literaturisto Vilmos Benczik, kiu ofte kunlaboras ankaŭ en nia revuo, ĵus akceptis

transpreni la vakantan postenon de la redaktoro de la beletra fako en la nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*. La novan eldonon, pri kies libroforma apero estas ankoraŭ frue paroli, ĉefredaktas d-ro Ulrich Lins. La laboro okazas sub aŭspicioj de CED kaj kun apogo de la eldonisto Juan Régulo Pérez.

Neergaard

- Prof. d-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, antaŭ nelonge ricevis apartan honoron: La Hinda Nacia Akademio de Sciencoj, New Delhi, elektis lin eksterlanda membro (Foreign Fellow). Inter la nemultaj ceteraj eksterlandaj membroj de la Akademio estas ankaŭ la usona plantbredisto kaj Nobel-premiito Norman E. Borlaug ("patro de la verda revolucio").

Nekrologoj

DICK PONTI

La 6an de novembro forpasis en Leiden, Nederlando, Dirk Mijndert Pot (1895-1976), en la Movado konata kiel Dick Ponti. Li estis internacie konata Cseh-metoda instruisto, membro de UEA dum multaj jaroj (ofte en la kategorio de membroj-subtenantoj) kaj fakdelegito dum jardekoj. Kiam la CO de UEA venis al Nederlando, li dum pluraj jaroj estis ĝia oficisto.

ANTE MARINOVIĆ

En Janjina sur la duoninsulo Pelješac, Jugoslavio, la 27an de septembro forpasis Ante Marinović (1895-1976). Li lernis Esperanton en 1922 kaj du jarojn pli poste fondis en sia loĝloko E-societon. Ankaŭ lia filo Miče, mortpafita de italaj faŝistoj en 1943, estis esperantisto. Marinović estis dum multaj jaroj delegito.

DAVID TACHAUER

En Gvaram, Israelo, la 29an de junio forpasis David Tachauer (1885-1976), dum multaj jaroj delegito kaj dumviva membro de UEA.

PAWEL KULOZIK

Multjara delegito de UEA en Katowice, Pollando, gvidinto de multaj E-kursoj kaj unu el la plej elstaraj aktivuloj en la loka Movado, Pawel Kulozik (1912-1976), forpasis la 7an de junio.

ANTONIO CRIACH VALLS

Dumviva membro kaj fakdelegito de UEA, aktivinto en Universala Ligo, Antonio Criach Valls (1899-1976) forpasis meze de aprilo en Calella (Barcelono, Hispanio).

WITOLD MAJEWSKI

La 13an de septembro, en Varsovio subite mortis Witold Majewski (1908-1976), multjara aktivulo en la pola Esperanto-movado. Li aparte okupiĝis pri Esperantaj ekspozicioj. Inter la taskoj, kiujn li plenumis dum multaj jaroj, estis ankaŭ la prizorgado de la tombo de d-ro Zamenhof kaj de florbedo antaŭ la iama domo de Zamenhof en Dzika 9 (nun: Zamenhofa 9). Li estis membro kaj fakdelegito de UEA.

LJUBICA RAJŠIĆ

La 21an de oktobro 1976, en Zemun, Jugoslavio, forpasis Ljubica Rajšić, membro de UEA dum pluraj jardekoj, patrino en familio en kiu Esperanto ĉefrolas jam ĉe la tria generacio.

ROSARIO SGROI

Fine de la pasinta jaro (la 23an de decembro), en Katanio (Italio), mortis Rosario Sgroi (1913-1975), tre konata aktivulo en la itala Movado. Li lernis Esperanton jam en 1927 kaj i.a. fondis la unuan E-grupon en Sicilio. Al la loka grupo li postlasis tre riĉan bibliotekon, tiel ke Katanio nun havas la plej grandan E-bibliotekon en la suda Italio. Dum multaj jaroj li estis membro de UEA, lastatempe ankaŭ de Societo Zamenhof.



NAZARENO CARUANA

La 22an de septembro mortis en Malto Nazareno Caruana (1935-1976), unu el la kunfondintoj de Malta Esperanto-Societo. Li estis tre aktiva tradukanto de Esperantaj beletraĵoj en la maltan lingvon (v. nian revuon, aprilo 1976, p.67).

Oficiala Informilo

N-ro 502, 1976 10 31

NOVA ĈEFDELEGITO ITALA

Sekve de sia elekto al la funkcio de prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, la ĝisnuna ĉefdelegito de UEA por Italujo, d-ro Nicola Minnaja, decidis rezigni pri tiu ofico. Konforme al la art. 14 de la Ĝenerala Regularo de UEA, IEF nomis kiel novan ĉefdelegiton d-rinon Catina Dazzini, via Palestro 36, I-54100 Massa (Toscana). Kiel antaŭe, la ĉefdelegito por Italujo okupiĝas unuavice pri varbado de membroj kaj delegitoj, dum la taskojn de kotizperanto plenumas la landa asocio.

NOVA ĈEFDELEGITO POR BRAZILIO

Okaze de la 11a Seminario de Kultura Kooperativo de Esperantistoj estis nomita kiel nova ĉefdelegito por Brazilo s-ro Giuseppe Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília (D.F.). Li transprenas la oficon de s-ro Antonio J. Vaz, kiu servis kiel ĈD jam de 1941.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRIT: K. Singh. FRG: R. Huber.

SOCIETO ZAMENHOF 1976

US: 217 E. James Lieberman; 218 Wm. J. Ford.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

FRG: 11 Felix Epstein. NOR: 12 Andrejs Armanis. US: 13 Adrian Hughes. AŬSTRAL: 14 A. Einihovi. BEL: 15 Gustaaf Goossens. FRG: 16 Hertha Franck; 17 Martin Gründler; 18 Richard Schulz. NED: 19 G.M.J.B. Peet; 20 M.C. Keizer-Blokker; 21 J.S. Rooke. US: 22 E. James Lieberman; 23 R. Kent Jones.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1977 02 15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BELG: Cesar Vanbiervliet, FD (biblioteko), Kortrijk. BULG: Stojčo Cankov, D, Ruse; Georgi Cvetkov, FD (mara navigado), Varna. FRANC: Jeannine Vincent, D kaj FD (Mensa, religio katolika), Barjac; Sylvie Bonnet, D, Les Andelys; F. Lo Giacomo, FD (lingvistiko, Mensa), Paris; Marie Thérèse Liouville, FD (ekonomiko), Paris. FRG: Richard Hirsch, FD (filatelo: Esperanta), Bad Hersfeld; Kurt Meyer, FD (inĝenierado konstrua), Bremen; Anneliese Beppeling, FD (arthistorio, rajdsporto, terapia rajdado por handikapuloj), Hamburg; Franz Jodozi, D kaj FD (televidotekniko, turismo), Hürt-

genwald; Anna Maria Orterer, FD (filatelo, turismo), Kreuth; Hans Barmaneter, FD (filatelo), Memmingen. ITAL: Ferruccio Masnata, FD (medicino: psikiatrio), Genova. JAP: Kiuja Komamura, D, Iiyama; Seiziro Kawamura, FD (turismo), Kyôto; Tadafumi Ikenoja, FD (agrikulturo), Numazu; Tsume Saito, VD, Sendai; Akio Ooba, VD, Sizuoka; Yosikazu Takeuti, VD, Takatuki; Sadami Tanaka, D, Takatuki. JUG: Dušan Adnadj, D, Borovo; Mira Lipičar, FD (fervoja labor-juro, juro), Ljubljana; Anja Hurčak, FD (instruado), Rijeka; Alois Perc, D kaj FD (turismo), Sevnica. LUKS: Albert Wickler, D, Luxembourg. MEKS: Guillermo L. Quevedo, FD (arkitekturo), Chihuahua. NED: Henk Diender, D kaj JD, Kampen. SOV: Anatolo Gončarov, D, Barnaul; Aristids Mediņš, D, Riga; Johannes Palu, D, Tallinn. SVIS: Hans Herrmann, D, Bern. US: Jonathan Cole, D, JD, FD (vegetarismo), Broomfield; Mary Murray, D, Colfax; Jonathan Pool, D, Old Field kaj FD (lingva politiko), Stony Brook; Jim Deer, FD (komputeroj), Portland.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1976:

AŬSTRAL: Melbourne, FD (fotografio, meteorologio). BRAZ: Alto Paraiso, VD kaj FD (medicino). ĈEĤOSL: Nová Paka; Praha, FD (politiko internacia). FRANCO: Les Andelys, D, FD (instruado, Mensa, religio: katolika); Thouars. FRG: Bergisch Gladbach, FD (sporto: longdistanca kuro), JD; Fürth; Lahr; Miltenberg; Speyer, D. HISP: Calles. ITAL: Verona, FD (ŝako). JUG: Janjina. KAN: Kelowna. KOSTARIKO. MONAKO. NED: Amersfoort. POLL: Katowice, D; Warszawa, FD (filatelo). PORT: Lisboa, D, FD (diagnetiko, scientologio, turismo), JD. SVED: Malmö, FD (stenografio).

SVIS: Samedan-Engadin. US: Zanesville.

DONACIOJ 1976 (Gld.)

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Haga Sekcio de LEEN 15,00. Sumo ĝisnuna 4964,32.

ĜENERALA KASO: Danlando: E. J. Frost 4,17. Finnlando: anonime 19,75. FR Germanio: K. Schmalzl

52,19; K. Simon 26,10. Italio: R. Paintner Trumpp 867,00. Nederlando: D. de Boer 10,00. Usono: J. Lieberman 49,58. Sumo ĝisnuna 5254,57.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO, 1976: 22 R. Paintner Trumpp, Italio; 23 M. Meywes, Nederlando.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 6

(pri la demando v. nian novembran numeron, p. 196)

A

- Hofburg, Wien, Aŭstrio
- Poŝtkesto 46, 00 950 Varsovio, Pollando
- Rue de la Reine, 13, Bruselo, Belgio
- 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris
- F-49150 Baugé, Francio

B

- Esperanta biblioteko kaj muzeo
- Regulaj radioelsendoj en la Internacia Lingvo
- Duonmonata Esperanto-gazeto
- Internacia Kongreso 1976, Gotenburgo, Svedio
- Someraj studperiodoj en kultura domo

- La Internacia Esperanto-Muzeo troviĝas en la iama imperiestra kastelo Hofburg en Vieno. Ĝi estas aparta kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Eblas viziti la

